



Zamenhof klopodis por krei niajn lingvajn instituciojn kaj por starigi la Fundamenton. En la Unua Universala Kongreso li sukcesis ne nur tion fari, sed ankaŭ ricevi la aprobon kaj konsenton de la Esperantistoj.

Per la starigo de la Fundamento li starigis monumenton,¹⁾ kiu ĉiam estos konsiderata kiel evento en la formiĝo de nia tradicio: li per tio fiksas la precipajn leĝojn ankaŭ la precipajn bazajn formojn kaj la ĉefan stilon de nia lingvo. La evoluanta tradicio aldonos elementojn konformajn al la hieraŭa tradicio...

Per la kreado de niaj lingvaj institucioj li fondis arbitracian organon, kies esenca tasko estas kontroli la evoluadon de la lingvo, t.e. agi aŭ reagi, kiam ekaperas breĉo ne solvebla per la Fundamento; aŭ pli grave, kiam ekaperas du aŭ pluraj solvoj por ŝtopi unu breĉon.

Tiuj komprenas tiujn simplajn nociojn... Sed aliaj ilin kontraŭbatalas, opiniante, ke la Fundamento estas "anakronisma" kaj la institucioj detruendaj. Supozeble ili pli-malpli klare opinias, ke ili estus pli liberaj mem mastri la lingvon laŭ siaj altaj inspiritaj ideoj (?) Ĉu ili ne pekas per troa orgojlo kaj ambicio?

Niaj legantoj decidus! La Akademio estas tre liberala, kaj ne estas ĝia tasko ĝeni la diversajn skolojn literaturajn aŭ aliajn, kiuj defendas tian aŭ tian evolu-vojon. Almenaŭ ĝis ili mem ne atakos, ekzemple, du el la ĉefaj principoj de nia lingvo: la internaciecon (Regulo 15) kaj la aŭtonomecon de la lingvo (sistemo de propra afiksaro). Aliaj, al kies kohorto, apartenas ĉiuj niaj legantoj, firme defendas niajn instituciojn: skribante tiujn liniojn, mi ĵus eksciis, ke iu grupo subvenciis la Akademion per sumo valoranta proksimume 1000 guldenojn. Mi ankaŭ povas informi, ke la eks-prezidanto de UEA, Prof. Tonkin, promesis al mi mem kaj al la Sekretario de la Akademio, S-ro Thierry, en la Universala Kongreso de Roterdamo, ke nun nia granda mond-asocio ĉiujare havos en sia buĝeto similan sumon por subvencii la Akademion! Aliaj asocioj sekvas kaj ni publikigos la bilancon en iu proksima numero.

Ankaŭ niaj legantoj ekde nun sendos sian reabonon kaj kotizon; ili ankaŭ provos varbi ĉiujn defendantojn de la Akademio: nia financo tre atendas la subtenon de ĉiuj niaj amikoj ankaŭ por niaj venontaj eldonoj (du novaj numeroj de la Oficiala Bulteno) kaj por ampleksigo de la Letero.

D-ro André ALBAULT

1) Aperos post kelkaj tagoj libro de nia Prezidanto: "Naŭ Prelegoj pri la Fundamento" ĉe Iltis-Eldonejo (105 p.)

OFICIALAJ INFORMOJ de la AKADEMIO de ESPERANTO

Sendependa lingvo-institucio fondita de D-ro L.L. ZAMENHOF en 1905

N-ro 14 (Majo 1990)

PRI DERIVAĴOJ DE KOMUN/A : KOMUNUMO, KOMUNAĴO, KOMUNO

Komunumo: pro la evoluo tiu vorto prezentas hodiaŭ tri ĉefajn signifojn. Nome,

1. Plej eta teritorio organizita por la komunaj interesoj de siaj loĝantoj.

2. Kia ajn homa grupiĝo (loka, regiona, monda) prezentanta komunajn interesojn por siaj membroj.

3. Internacia grupiĝo de ŝtatoj kun komunaj interesoj.

Komunaĵo: Io komuna, punkto komuna al du aŭ pluraj personoj.

komuno: tiu vorto neniel povas signifi komunumo 3 laŭ la ĉi-supra difino, por kiu signifo ĝi cetere ne havus spĉcifan adjektivon.

*La Direktoro de la Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro,
Bernard GOLDEN*

*La Prezidanto de la Akademio de Esperanto,
D-ro André ALBAULT*

Legite el "THE AUSTRALIAN ESPERANTIST" (n-ro 262):

"La LETERO DE L'AKADEMIO DE ESPERANTO ĵus eldonis sian 11-an numeron... kiu volas scii pri la aktuala stato de la lingvo kaj la opinioj de l'Akademio, tiu trovos La Leteron orminejo."

Abono kostas: 120FF jare "

NI DANKAS la Estraron de Institucio Hodler 68.

Legite el letero de Institucio Hodler 68 "Mi ĝojas povi informi vin, ke ankaŭ ĉi-jare la Estraro de Institucio Hodler 68 decidis subvencii la Akademion de Esperanto per sumo de nlg.1000."

(J.Rapley).



KRONIKO de la NUNTEMPO

« POR HUNDON DRONIGI ONI NOMAS ĜIN RABIA ! »

Kio nova en la 103-a jaro de la lingvo?

Nu, "Hermano Bermano" aperigas pamfletojn interalie sub influo de "Rikardo Sulco": "Pri la absoluta malneceso mortigi la Akademion de Esperanto". Tian dirmanieron* estigis ĝuste la malakcepto de la "Analiza Skolo" fare de la Akademio. Eĉ pri la sama temo en "Speciala Cirkulero 58" iu sennoma "redaktisto de la oficiala organo de landa asocio" per poŝtkarto adresita al H.B. promesigas "brulpunon" al la Sekretario de la Akademio!!!

En 1988 nur du akademianoj ne prezentis sian rekandidatiĝon, unue komprenigante, ke la lingvo jam ne bezonus Akademion, sed poste pretekstante, ke la decido pri Koreo** ne plaĉas al ili! Kaj samkaŭze ankaŭ Mark Fettes, la redaktoro de la organo de UEA, rifuzas publikigi la "oficialajn informojn de la Akademio" (ago eĉ kontraŭa al la statuto de UEA!).

Ja "por hundon dronigi oni nomas ĝin rabia"! Kaj verŝajne pro tio Claude Piron en sia "Bona Lingvo" asertas, ke la Akademio estas tro influata de francoj spite al la fakto, ke la anglalingvaj membroj estas pli multaj ol la franclingvaj; li deklaras eĉ, ke tion estigis "helpe de Kartezio la maldekstra cerbo", kvankam de longe jam estas kutime distingitaj de la francoj du mensoformoj tiel nomitaj de la fama sciencisto kaj verkisto Blaise Pascal: "la "geometrieca menso" kaj la "fajneca menso".

Kaj jen en aprilo, en "FONTO", William Auld, iama membro kaj prezidanto de la Akademio, leginte la eseon pri "La Bona Lingvo", ne hezitas skribi, ke "en la nuna stadio de nia lingvo Akademio estas anakronismo"***

Li aldonas eĉ opinion pri la Franca Akademio, kiu opinio koncernas nur lin, ĉar en Francio la Franca Akademio estas pli respektata ol li supozas! Sajno trompas!

Kaj jen en junio, tra UEA, Thomas Eccardt, prezidanto de Novjorka Esperanto-Societo, skribis leteron al la Akademio de Esperanto. La letero entenas multajn proponojn; cetere ne multaj estas novaj: iu sufikso "un/o por indiki viran sekson, la uzø de y por anstataŭi supersignon" kun nura aludo pri la ideoj "elimini la akuzativon kaj la refleksivon, (eĉ) malpliigi la nombron de konsonantoj, ktp..."

Jes, karaj geamikoj de la AKADEMIO DE ESPERANTO, jen estas nekredeble, kiel nuntempe en la 85-jara ekzisto de la Akademio pluraj montriĝas pretaj subfosi la institucion nur pro decidoj, kiuj simple ne plaĉas al ili!

(daŭrigo p.5)

.../...

REFERENCOJ DE AKADEMAJ DECIDOJ

D-ro André ALBAULT

La 8 Oficialaj Aldonoj al la Universala Vortaro

- F-taj vortoj indikitaj per * en PIV.
- Oficialaj vortoj indikitaj per eksponantaj ciferoj en PIV.

1-a Oficiala Aldono: aparta broŝuro: *Kajero dek-tria* (Julio 1909), *ESPERANTISTA DOKUMENTARO*. Eld. Esperantista Centra Oficejo, Paris, 1909. 31 paĝoj. (fakte kun tradukoj al la 5 lingvoj de la Fundamento- Entenas 864 radikojn).

2-a Oficiala Aldono: sur p.4/14 de aparta broŝuro: *Kajero trideka* (Julio 1919), *ESPERANTISTA DOKUMENTARO*. Eld. Esperantista Centra Oficejo, Paris, 1919, 16 paĝoj. - Enhavo: I. Enkonduko. - II. Sufikso "ism". - III. Internaciaj vortoj. IV. Komune uzataj vortoj. - V. Konkludo: pri la labor-metodoj de la Lingva Komitato. - Aldono: Regularo pri verkoj ĉekompencotaj de la Akademio. -

(Fakte: en parto III: nura listo de vortoj sen tradukoj: p.5/9; en parto IV: vortoj kun tradukoj al F.A.G.: p.9/12 (piednoto anoncas kaj informas: "La pola kaj rusa tradukoj estos poste aldonataj.")

- Kiam la notoj bot., zool., k.t.p. troviĝas en unu lingvo, ili ne estas ripetitaj. Ne estas eble, aliparte, en multlingva traduko doni ĉiujn eblajn tradukojn; tio estas afero de la naciaj vortaristoj, kiuj povas, laŭ konsilo de D-ro Zamenhof, sin helpi per la alilingvaj tradukoj.")

(Rim. de A.A.: ankaŭ en parto III enestas kelkaj vortoj bot., zool.: mi neniam trovis la anoncitan aldonon kun Polaj kaj Rusaj tradukoj.: entenas 480 + 111 radikojn kaj plie 2 radikalojn: tramvojo, tramveturilo)."

3-a Oficiala Aldono: *En oficiala Gazeto esperantista, 8-a vol., n-ro 5-6 (82-83) de 25 JAN 1922-p.153/164*; enestas 2 partoj redaktitaj de Grosjean-Maupin: "I-a parto: radikoj propre esperantlingvaj aŭ proprigintaj (ĉiun radikon sekvas seplingvaj tradukoj laŭ la jena ordo: Angla, Franca, Germana, Hispana, Portugala, Itala, Pola.) - 2-a parto: internaciaj radikoj uzeblaj laŭ la regulo 15." (Fakte tie aperas la tradukoj al la samaj 7 lingvoj: sed okazas mankoj. Entenas 61 + 131 radikoj, inter kiuj 2 propraj nomoj: Jesu/ kaj Jud/; eblas diri nenion pri tiuj majuskloj, ĉar ĉiuj vortoj aperas kun majuskloj!).

En FEB 1923 estiĝis dubo pri la ĝusta formo de kelkaj oficialaj vortoj: analog/a - analogi/o, konfidenc/o - konfidenci/o, nekrolog/o - nekrologi/o, Jesu/o - Jesu/o, budĝet/o - buĝet/o. El 73 anoj voĉdonis 62, valoris 59: fine, 52 voĉdonis por analog/, 53 por konfidenc/, 46 por nekrolog/, 34 por Jesu/ (juĝita nesufiĉa), nur 3 por buĝet/. Konkludo: nenio ŝanĝita por konfidenc/, nekrolog/, budĝet/, Jesu/. Sed analog/ estis oficialigita anstataŭ analogi/ kiu perdis sian ofici alecon. Tamen oni forgesis noti tion en la 4-an Oficialan Aldonon.

4-a Oficiala Aldono: sur paĝoj 4/8 de la *Kajero/ de la Oficiala Bulteno de la Esperantista Akademio* (Junio 1929).

Nur unu listo de 118 radikoj sub redakto de Grosjean-Maupin (inter ili unu propra nomo: Amoro). Tradukoj al F.A.G. - Plie, sur paĝoj 25/29 (1/5) de la *Kajero II* de la sama bulteno (Februaro 1930) aperas la sama O.A. sed ĉi-foje kun tradukoj I.H.P.Kt. (do sudaj Latinidaj lingvoj.).

.../...

5-a Oficiala Aldono: apero en Junio 1934 sub la redakto de L.Bastien kun denove du listoj kun kutimaj titoloj: 5 + 3 radikoj (mi ne havas)

6-a Oficiala Aldono: apero en Aprilo 1935 sub la redakto de W.Bailey kun la sama formo de du listoj: 15 + 6 radikoj. (mi ne havas)

En Oktobro 1953: oficialigo de sufikso -end.

7-a Oficiala Aldono: en *Oficiala Bulteno de la Akademio de Esperanto* (4-paĝa eldonaĵo numerita 1 (ĝi devus numeriĝi "7") kaj datita DEC 1958) I-a listo: *Fundamentaj radikoj*: a.- 83 komunaj vortoj (kun tre simplaj difinoj); B.- 35 propraj nomoj (kun skemaj indikoj: antaŭnomoj, popoloj, kontinento...) 2-a listo: oficialaj radikoj (16 nomoj ĉefe je log/); 3-a listo: oficialaj radikoj (15 nomoj ĉefe je -graf/).

Konklude, sekvas indiko pri la nombro de Fundamentaj (2759) kaj de Oficialaj (1777); entute: 4536, el kiuj 64 propraj nomoj.

8-a Oficiala Aldono: sur paĝoj 11/27 kaj sub redakto de Albault aperis en *AKTOJ de la Akademio*, II 1968 - 1974 (*Oficiala Bulteno de la Akademio de Esperanto - N-ro 10*). Tri partoj:

I. *Fundamentaj radikoj* (kompletigo de la 7-a O.A.: 12 komunaj radikoj, 2 propraj nomoj).

II. *Paralelaj formoj. Diversaj ĝustigoj. Landnomoj* (A: 6 formoj kun ĥ = k; vipero = vipuro; buĝeto = budĝeto; proleto = proletario; federi apud federacio, riveli apud revelacio; sateno (ŝtofo) kaj atlaso (kartaro) malgraŭ la jam oficiala atlaso (ŝtofo) ; difterio = difterito, glukoso = glikozo. B. koncentra eksoficialigita (= samcentra); koncentri= kunvenigi; maldilui; kutimi = havi kutimon; apud nulo estas oficialigita la numeralo nul!; finaĵo -aŭ ne elfaligebla; oficialigo de 4 vortoj kun -i- --C Landnomoj: 32 oficialigitaj landnomoj, 15 oficialigitaj landano-nomoj, nuligo de la antaŭa malkonsilo de la Lingva Komitato al sufikso -io.).

III. *Oficialaj Radikoj* (151). *tiuj radikoj aperas kun konciza difino kaj tradukoj al A.F.G.H.I.P.*).

(Kroniko de la nuntempo...)

Raymond Schwartz siatempe prikantis la Akademion laŭ la ario de "Gaudeamus igitur":

Certe ke l'Akademi' estas kompetenta;
kaj neniam ĝi eraras, kiam ĝi nenion faras.
Tio estas evidenta!

Ja tiutempe la Akademio efektive nenion faris, krom sankcii kelkajn novajn radikojn; sed kompreneble tuj kiam la Akademio malkonsentas oficialigi erarojn, tiam kelkaj klopodas por forigi ĝin!

J.T.

* Ĝin oni nomas antifrazo!

** Kvankam decido demokratia!

*** Dume el Germanio aperas nova projekto de lingvo: "Unitario"!

LA LEGANTOJ SKRIBAS...

"Ne gravas, se foje vi ne konsentas... La vivo estas tia, ke ĉio progresas nur el kontraŭstarigo de ideoj! La sola problemo estas konscii pri tia neceso kaj ne transformi kontraŭstaron de ideoj en kontraŭstaron de homoj!"

1-Utilas kaj necesas la Akademio- "Karaj geamikoj de l'Akademio, Jam de kelka tempo mi legas el kelkaj artikoloj kaj verketoj plurajn opiniojn de homoj (eĉ iamaj akademianoj!), kiuj ŝajne deziras nur malaperigi la Akademion. Vere mi miras!... ja ne komprenas tian sintenon! Kaj mi konsilas al ĉiuj tiuj neniigontoj relegi kaj primediti la jenajn pensojn de D-ro L.L.Zamenhof, kiu ja multfoje pruvis, ke li estis natur-dotita per genia lingvo-sento.

"... Kun la Fundamento ni devas esti tre singardaj; ĉar, se ni ĝin rompos sen ia tre grava bezono kaj sen KOMUNA INTERKONSENTO, tiam la tuta lingvo ruiniĝos".

(Letero al C.Bourlet, 17/11/1911)

"... Fari oficialan decidon pri tiu aŭ alia duba lingva demando havas la rajton nur nia Akademio, post voĉdona interkonsiliĝo..."

(El "Antaŭparolo al la Lingvaj Respondoj/1910)

"... Tute erara estas via opinio aŭ la opinio de s-ro Boirac, kvazaŭ per mia projekto mi volus malhelpi enmiksi min en la aferojn de la Akademio. Ne! multajn fojojn mi diris, ke la decidojn pri ĉiuj lingvaj demandoj mi lasas tute plene al la Akademio... Mia projekto prezentas ja ne ian private faritan decidon, sed nur mian personan opinion, kiun mi tute discipline submetas al la decido de la prezidanto de la Akademio..."

(Letero al Generalo Sebert 16/1/1909)

Tial mi ne komprenas la sintenon de tiaj sin nomantaj esperantistoj, eĉ samideanoj, kiuj tiel akre pridiskutas la demokrate faritajn arbitraciajn decidojn de la AKADEMIO."

(G.G., - Bologna).

R.- Ankaŭ por ni estas nekomprenebla tia sinteno, kiu malakceptas la neceson de arbitracio en okazo de kontraŭstaro inter tezoj samvaloraj sed nur laŭtradicie unu preferinda al la alia! Cetere - kiel legeble ĉi-poste ne ĉiuj bone komprenas la sencon de lingva tradicio! (J.T.)

2- Planlingvo kontraŭ tradicia lingvo

"Unu avantaĝo de planlingvo estas, ke la planado "portas" ° al pli da reguleco, simpleco, logikeco ĉe la planata (ne planita) lingvo. La celo de tiu planado estas ja igi la lingvon pli facile lernebla, uzebla, sume pli praktika..."

(Ĝuste per tiaj ecoj) diferencas planlingvo je la ekzistantaj naciaj, do tradiciajn lingvoj.

...Se ni lasos, ke ankaŭ Esperanto ĝis iu dato planadite poste ne estas plu, ĝia konfuzo baldaŭ egalvaloros tiun de la aliaj (naciaj) lingvoj. Nenion fari signifas lasi fari... Se ankaŭ la Akademio opinias, ke estas pli bone lasi fari kaj poste konstati la senordan pliformiĝon de nia lingvo, ne restas multe da espero pri la konservo de la Esperanta facileco."

(Victor P.Epp-Westmount/Québec-Kan.)

R.- Tradicio tute ne implicas lasi fari malordon en la lingvon! Esperanto havas nun pli ol centjaran tradicion, tio signifas nur, ke ĝia ĝisnuna uzado historie observas la aplikadon centjaran de difinitaj reguloj kaj kutimoj, ankaŭ dirmanieroj, kaj ĝuste tia observado konservas ĝian facilecon kaj regulecon. Eĉ tial estis fonditaj kaj la FUNDAMENTO kaj la AKADEMIO, por evitigi eventualajn deviojn, aŭ laŭdirajn "plibonigojn" eĉ en la nomo de iu "logiko". Ĉu ne estas D-ro L.L.Zamenhof mem, kiu skribis en la REVUO (1906):

.../...

(daŭrigo p.7)

mia listo pri tia afero, kiu cetere estas pli ŝovinisma ol lingvistika! "Ukrajna" estas la Akademia formo, kaj kiel prave skribis D-ro L.L.Zamenhof, "la Akademio devas ĉion esplori senpasie, ne lasante sin terorizi per laŭtaj krioj." Ja malgraŭ tio la Redaktoro de ESPERANTO" ĝis nun rifuzas aperigi la lastan rekomendon de la Akademio pri la landnomoj!

Vi tute prave korektis "ŝuld-", "eksped-", "intervju-", "dediĉ-iĝas", ĉar verŝajne la Redaktoro volas tiel eviti diskuton pri "at-" aŭ "it-". Kio estas malbona sinteno sub ĝermana influo: anstataŭi la pasivon per "iĝi", kiel la germana helpverbo "werden"! (J.T.)

D.-Neologismoj- Fine mi volas scii, kion signifas "deskribo" kaj "printilo", kiuj estas nenie troveblaj. (J.D.-Calais)

R.- "Deskribo" ekster kunteksto signifas nenion alian ol latin-eskan formon de "priskribo", kaj "printilo", kiu troviĝas en la "Suplemento de PIV" signas la aparaton, kiun oni aldonas al komputoro por presi tekston. (J.T.)

Eraro.- La neuzo de la sufikso -ino pri ŝia profesio tiel ŝokis S-inon Vincēnt, ke ŝi erare atribuis al S-ino L.Marin la rimarkon pri tio faritan de la Redakcio, nome ke tia nova modo en Esperanto verŝajne estas ŝuldita al influo de la angla lingvo. Venis protesta letero de S-ino L.Marin precipe pro la vorto "skandalo" uzita de S-ino J.Vincent; kaj en tiu protesta letero S-ino L.Marin petas la publikigon de jenaj frazoj skribitaj al ŝi de S-ino J.Vincent:

"Pri la citita frazo, kiu prave kolerigis vin, mi konfesas, ke mi erare atribuis ĝin al vi, dum ĝi apartenas al "N.de la R." (L.A. n-ro 10 p.8). Mi tre bedaŭras tiun fuŝaĵon, kaj petas vian pardonon"

(L.Marin, Paris)

R.- Jen farite! Kiel ĉi-supre skribite, "ne transformi kontraŭstaron de ideoj en kontraŭstaron de homoj!"

(La legantoj skribas...)

"Ankaŭ en Esperanto troviĝas diversaj (ne multaj) idiotismoj, kaj tute malprave kelkaj Esperantistoj ilin kontraŭbatalas, ĉar lingvo absolute logika kaj tute sen idiotismoj estus lingvo sen viva kaj tro peza; sed kvankam kelkaj el la Esperantaj idiotismoj estas prenitaj ankaŭ el la lingvoj slavaj (dum aliaj estas prenitaj el aliaj lingvoj), ili tamen estas ne slavismoj, sed esperantismoj, ĉar ili fariĝis parto de la lingvo". (J.T.)

o "portas" = emas al

3.- Ĉu manramo aŭ pavimbatilo?

"En la 7-a paĝo de la lasta LETERO B.Golden skribis: "Ĝi akiris la nomon "Aries", ĉar unu ekstremaĵo de la fortikigita horizontale trabo estis provizita per skulptaĵo havanta la formon de kapo de virŝafo". Laŭ mi la nomo (Aries = ŝafo) devenas de tio, ke ŝafoj interdisputas per mirigaj kapobatoj fortigitaj per ekbaŭmoj. Sekve tiu militilo havas la nomon ŝafo laŭ imito, same kiel ĉevrono estas imito de kaprina dorso, kiam ĝi etendas sin streĉe. Ankaŭ katalune ni diras el nomo "cabra" (kaprino) "cabiro" por la subplankaj kaj subtegmentaj trabetoj.

La traserĉo de Golden pri RAMO laŭ mi estas nura kuriozaĵo propra al lingvistoj. Kiel nomas ĝin la Azianoj? La vorto RAMO perfekte taŭgas... por tiu aparato uzata de masonistoj kaj stratiparistoj vertikale, horizontale aŭ alie... Por la iama estinta "ŝafo" restu Arieso, kiu ne ĝenos la ĉielan zodiakon..." (S.G.Reus)

R.- Nur el interkruciĝo de ideoj ŝprucas lumo: sed teknikilojn devas nomi principe la uzantoj! (J.T.)

DEMANDOJ KAJ RESPONDOJ

D.-Editoralo - "Mi miras pri la uzo de la vorto "editoralo" en "La Letero"; el miaj vortaroj mi konas nur la radikon "editor", sed ĝis nun ne vidis en ili la radikon "editoral" kaj "al" estas por mi prepozicio aŭ, se sufikso, nur scienca. Tio tiom pli mirigas min, ke en sia "Dictionnaire Français|Espéranto" D-ro A. Albault donas por "éditorial" la tradukojn "front-" aŭ "ĉef-" aŭ "kap-artikolo", kiu ŝajnas al mi pli zamenhofaj, pli esperantecaj ol "editoralo". (J.D., Calais).

R.- Ĉi tiu vorto apartenas al la (angla-usona-franca) ĵurnalisto-teknika lingvaĵo: kiel nura neologismo, uzata sub la nuntempa influo, ĝi ja meritis piednoton kun la mencio, ke pli trafe kaj ofte ĝin anstataŭas "front", "ĉef", aŭ kap-artikolo", kvankam ĉi tiuj formoj pli substrekas la pozicion sur la unua paĝo ol la alia, kies ĉefa signifo ke ĝi restas artikolo de la redakcio aŭ gazet-direktoro. (J.T.)

D.-Verbigi - "Ĉu oni rajtas verbigi NUR adjektivajn radikojn aŭ ĉu oni havas la rajton ĝin fari ankaŭ kun iu ajn substantiva radiko? Mi konstatas, ke mi ĵus skribis "verbigi", kvankam "verb" estas substantiva radiko, sed "verbigi" ja kuŝas en la "Grand Dictionnaire Espéranto-Français" de nia altestimata Prof. G. Waringhien. Nu, D-ro Albault dufoje verbigas la radikon "ukaz" unuapaĝe de "La Letero" (n-ro 11-). "Ukaz" estas substantiva radiko, kaj ne estas indikite en la vortaroj, ke la verbo "ukazi" estas uzebla. (J.D. Calais)

R- "Verbigi" adjektivojn aŭ substantivajn radikojn oni ĉiam rajtas, kondiĉe ke oni respektu la efekton de tia verbigo: "verdi" ne signifas "esti verda" sed "impresi verde"; "ukazi" ne signifas "esti ukazo" "i per ukazo", iele agi per ukazo, same kiel "marteli" estas "agi per martelo". La uzo estas stilafero; kaj male al la karakterizo de multaj eŭropaj lingvoj, en Esperanto la radikoj facile povas alpreni tiun aŭ alian vortspecon. (J.T.)

D.-Korektoj "En la aprila "ESPERANTO" (n-ro 1012) mi korektis "Septembru! kun AIS, per "Pasigu septembron", aŭ "vivu septembre" kun AIS. Mi ankaŭ plurfoje korektis "prevento"-n (ĉar ne temis pri medicino) per "antaŭmalhelpo" aŭ "antaŭevito"; mi ankaŭ anstataŭigis "komplementas" per "kompletigas"; "domini" per "superregi", "ukrainia" (tre malpeza) per "ukrajna", kiuj troveblas en ĉiuj vortaroj. En la maja "ESPERANTO" (n-ro 1013) mi korektis ankaŭ "ŝuld-", "eksped-", "intervju-", "dediĉiĝas", per "estas ŝuldata, ekspedita, intervjuata, dediĉita". Ĉu prave? (J.D.-Calais-)

R.- "Septembru" signifas: "u septembre", kies valoro nuanciĝas laŭ la kunteksto (afero de stilo). Vi tute pravas pri "prevento": krom stilefektoj oni lasu la teknikajn aŭ sciencajn terminojn en iliaj precizaj uz-eblecoj. "Komplimentas" dependas de kunteksto: se temas pri gramatika analizo, ĝi estas prave uzita! Se ne, preferinde estas uzi "kompletigas". "Domini" estas neologismo de poezia kaj jura fontoj; pli elvokive estas "superregi"! "Ukrainia" apartenas al tiu dornoplana demando de propraj landnomoj; vi ja scias, kiel atakata estas la Akade- (daŭrigo p.7)

"LA LETERO DE L'AKADEMIO DE ESPERANTO", trimestra informa letero eldonita de "La Amikoj de l' Akademio de Esperanto", 5, rue Léon Cogniet F- 75017 PARIS- Francio
Redaktoro: Jean THIERRY, Direktoro de la publikaĵo: André BOURDEAUX Presejo: Coconnier, Sablé s/Sarthe.
C.P.P.P. n-ro 69710 I n-ro: 40 FRF Jara abono: 120FRF. Pagebla ĉe kontoj:
Banko: Crédit Lyonnais n-ro 7090 F Poŝtĉekkonto: 735 27 B Paris
U.E.A.: Poŝta Banko Nederlando 37 89 64 (ĝiroficejo Den Haag): precizigi "por la Amikoj de l' Akademio de Esperanto".

Peranto por tuta Azio: S-ro UMEDA Yosimi, I.P.O.B. 5458, Tokyo 100-31 Japanio

Peranto por Meksiko: S-ro Enrique LEMUS RODRIGUEZ, Insurgentes Sur, 3493; villa Ilimpica edif. 27-001 14020 Tlalpan, México DF Meksiko.